WIKIPEDIA

Siria lingvo

La **siria lingvo** estas parolata en Irano, Irako, Turkio, Libano, Sirio... de pli ol 100 000 da parolantoj. Ĝia ISO-kodo estas `syr`.

siria	
Parolata en	Irano, Irako, Turkio, Libano, Sirio...
Denaskaj parolantoj	pli ol 100 000
Skribo	Aramea skribo, Latina skribo
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	syr
ISO 639-3	syc
SIL	SYR (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=syr)
Glottolog	clas1252
Angla nomo	Syriac
Franca nomo	syriaque

La **siria lingvo** estas dialekto de la mez-aramea lingvo de la nordokcidentaj semidaj lingvoj de la afro-azia familio kiu estas skribata per la siria alfabeto, derivaĵo de la aramea alfabeto. Unue aperinte en la frua unua jarcento KE en Edeso, la klasika siria lingvo fariĝis grava literatura lingvo tra la Proksima Oriento de la 4a ĝis la 8a jarcentoj, konservita en granda tekstaro de siria literaturo. Fakte, la siria literaturo ampleksas proksimume 90% de la aktuala aramea literaturo. La siria siatempe paroliĝis tra multe de la Proksima Oriento same kiel Anatolio kaj orienta Arabio. La siria devenis de Mezopotamio kaj poste disvastiĝis okcidente de Irako, en kiu ĝi fariĝis la interlingvo de la regiono dum la Mezopotamia Nov-Asiria periodo.

Ĝi estas interesa por studantoj de la Nova Testamento, ĉar la siria literaturo inkluzivas fruajn tradukojn de grekaj tekstoj, kies originaloj estas perditaj. La lingvo estas ankoraŭ uzata en la siria ortodoksa eklezio.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Siria_lingvo&oldid=6657480"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 00:36, 29 jun. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.